

Esperanto en Svislando : Naskiĝo de *Svisa Espero*, Rondirantaj gazetoj
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 438 1972.03.01 & 04

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum prelegaro ni prezentos al vi historieton de la esperanto-movado en Svislando helpe de tekstoj, kiujn ni ĉerpas el la revuo *Svisa Espero*.

A.- *Svisa Espero* naskiĝis en februaro 1903. Ĝi estas do 69-jaraĝa.

Cl.- La unuaj numeroj de *Svisa Espero* estas manskribitaj kaj multobligitaj laŭ la tiamaj rimedoj. La kovrilpaĝo prezentas alpan pejzaĝon, kie brilegas granda kvinpinta stelo.

A.- Kiam oni foliumas tiujn unuajn numerojn, oni konstatas, ke preskaŭ ĉiuj tekstoj estas dulingvaj. Post duonpaĝo en esperanto, ĉiam sekvas traduko en la franca.

Cl.- Kaj la komitato de la ĵus fondita Svisa Esperanta Societo, en frontartikolo pri la celoj de *Svisa Espero* senkulpiĝas pri tiu dulingveco, dirante, ke ili estas komencantoj. Ni citas :

A.- « *Pruvi al nia svisa legantaro ke la lingvo neŭtrala estas ebla, ke ĝi efektiviĝis, ke ĝi estas uzata praktike, rakonti ĝiajn progresojn, admoni profiti ĝian utilon, doni al la fremdaj esperantistoj sciigojn pri nia lando; tiujn celojn havas la juna Svisa Esperanta Societo kaj ĝia revueto. La laboro estas granda, ni estas ankoraŭ malmultaj, nekonataj, nespertaj ; ni kuraĝu tion laŭte konfesi. Nur de kelkaj monatoj ni eklernis Esperanton. Eble ŝajnas iom senprudente « ekĵurnali » en tiaj kondiĉoj. Tia provo estus ridinda en ia ajn nacia lingvo, en Esperanto la entrepreno estas ebla. Ha! sendube ni ne prezentas al nia abonantaro literaturajn modelojn, ni tamen espereble sukcesos uzi, se ne elegantan, almenaŭ korektan kaj precizan stilon. »*

Cl.- Unu jaron poste, en la numero de majo 1904, artikolo titolita « *Rondirantaj Gazetoj* » donas interesajn informojn pri la metodo, kiun uzis la tiamaj esperantistoj, kiuj deziris rapide lertiĝi en la esperanto-praktiko. Ni legas erojn el tiu artikolo, ĉar ni opinias, ke la esprimitaj ideoj restas aktualaj :

A.- « *La kreado de Rondirantaj manuskriptaj gazetoj estas favore akceptita, kaj jam diversaj gazetoj ekzistas. En la esperantista korespondado, ĝenerale oni ne atentis pri la eraroj stilaj aŭ gramatikaj ; ĉar, ne konvenas korekti erarojn kiujn faris korespondanto en sia lasta letero. Aliflanke multaj esperantistoj ne klopodas lerni serioze nian lingvon kaj enigis ofte en la lingvon internaciajn naciismojn nekompreneblajn. [...] La Rondirantaj gazetoj havas la celon anstataŭi, per praktiko, instruadon kiu okazos en la estonteco en la superaj kursoj de esperanto. »*

Cl.- Sekvas klarigoj pri la funkciado de tiuj *Rondirantaj manuskriptaj gazetoj* :

A.- « *Grupo (maksimume 20 personoj) fondiĝas ; ano ekdirektas ĝin, kaj donas al ĉiu ordan numeron ; li skribas sur unu flanko de paperfolio esperantan tekston kaj lasas la dorson blanka ; li sendas ĝin al N° 2, kiu korektas sur la dorso la erarojn de N° 1 kaj skribas sian tekston sur alia folio, lasante same la dorson blanka ; la 3-a numero korektas la erarojn de l' 1-a kaj de l' 2-a, skribas sian tekston kaj sendas ĝin al N° 4, kaj tiel plu. Post la rondiro, la gazeto alvenas al N° 1, kiu elprenas sian folion kies dorso montras la korektojn de ĉiuj aliaj*

anoj, kaj post korekto de iliaj tekstoj, faras novan redaktaĵon kaj sendas ĝin al N° 2 kiu same agas, kaj tiel plu. Tiamaniere la rondirado elfariĝis kaj povas daŭri senfine. »

Cl.- La klariganto poste rakontas, ke la unua efektiviĝo de ĉi tiu ideo estis de sinjoro Bavay en Douai, Francio. Tiu sinjoro Bavay fondis malgrandan klubon, kiun li nomis Rondo Internacia l'Unua. Ĝi enhavis unu anon en ĉiu nacio. La gazeto de tiu rondo nomiĝis *Rondiranto*. Tiun nomon poste bulgaraj esperantistoj donis al presita gazeto. Tiuj rondoj multiĝis, kaj sinjoro Codorniu, inĝeniero en Murcia, Hispanio, kreis tutan rondirantan gazetaron. La unua rondiranta gazeto nomiĝis *Vaga Stelo*. En ĝi oni faris tradukojn. En alia kajero oni babilis. En tria oni korektis redaktaĵojn. Fine en gazeto titolita *Arbara Stelo* oni interŝanĝis teknikajn artikolojn pri arboscienco. Tiuj korespondaj kluboj multiĝis. Jen kelkaj informoj pri tiu, kiu funkciis en Svislando. Ni citas :

A.- *« En Svisujo, de du jaroj, la « Svisa Rondo » kunigas amike kaj konstante la esperantistojn la plej bonajn kaj la plej fervorajn de nia lando. Ili, per bonvolo kaj bonegaj konsiloj ebligis ĝis nun al nia societo antaŭeniri. Por rapidigi la rondiradon, regulo estas ne konservi la ĵurnalon pli ol 5 tagojn ; ĝi rondiras en 5 aŭ 6 semajnoj, kelkafoje malpli. Se iu ne povas skribi, li tuj sendas la ĵurnalon al la sekvanta ano, se ne, li pagas monpunon da dek centimoj por ĉiu tago da malfruo. Oni uzas la nekredeblan malkarecon de niaj poŝtaj prezaroj por rondirigi artikolojn gazetajn aŭ muzikaĵojn. La influo de tiu Rondeto estis tre grava sur la komencoj de Esperanto en nia lando ; ĉar ĝi ebligis al la Svisa Esperanta Societo rapide disvastiĝi en diversaj kantonoj. »*

Cl.- Tiu ĉi metodo ne nur favoris rapidajn lingvajn progresojn. Ĝi kreis amikecon inter la korespondantoj. Tiel homoj, kiuj ne havis la eblecon renkontiĝi, sin bone konis. Ili fariĝis veraj amikoj. Per babilado, per interesaj diskutoj pri plej diversaj temoj, ili sin reciproke influis.

A.- La unua mondmilito ĉesigis tiun lern-kutimon. Ni opinias, ke eĉ nun ĝi povus multon alporti al la studemuloj kaj korespondemuloj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!